

NEMOŽNOST MIMOVOLNÝCH VÝVOJOVÝCH ZMĚN V ESPERANTU.

Napsal prof. *Rudolf Fridrich*.

Z pochybovačných výroků o esperantu je nejjzávažnější a zdánlivě nejdědětější onen, který namítá, že je marné úsilí o mezinárodní jazyk, poněvadž jeho osud prý bude konec konců týž jako všech národních jazyků. I esperanto prý za nějakou dobu podlehne změnám, utvoří nářečí a může prý se přihoditi, že esperantisté jedné poloviny zeměkoule nebudou rozuměti esperantu svých protinožců. Tak slýchám z úst lidí studovaných, zejména filologů.

Stanovisko esperantistů vůči podobným obavám je pevné. Už dávno přestali býti v palčivé otázce mezinárodního jazyka theoretiky, vědouce, že by bylo možno pochybnostmi o budoucnosti esperanta ztratiti celá desetiletí, drahá pro ně i pro lidstvo. Nechtěli se podobati lidem, kteří by pro samou skepsi o osudu železnic, pošty a telegrafu neužili výhod těchto prostředků. Poznali esperanto a užitek z něho a dali se do práce. A v tom okamžiku pochopili závazky, jež jim řekla pouhá slova: mezinárodní jazyk pomocný. Ukládáť esperanto samozřejmou a nevyhnutelnou i sladkou povinnost tomu, kdo seznav jeho naléhavou potřebu, je přijal. Je to povinnost jazyk ten důkladně znáti a neměniť jej, jestliže chce býti účasten výhod z něho, to jest dorozuměti se s ostatními esperantisty.

Arci namítají dále theoretikové, změn úmyslných do esperanta nebude snad zaváděti nikdo, ale esperanto se změni časem v ústech samo, bez vědomí mluvících.

Zde jsme u jádra věci. Váhu této námítky, která by byla s to vzbuditi beznadějnost a odniti nám chut, kdyby byla pravdiva, uznali již odborníci otázku touto se zabývající (p. dr. Emil Smetánka, Prof. dr. Lambert, René de Saussure), vyvrátili ji, ale soustavně na lichost obavy této a vratkost srovnání dosud neposváčeno.

Kolikeré to změny mohou vůbec postihnouti jazyk?

Změny jazykové skutečně dle vzniku rozeznáváme dvojí. »Za prvé takové, které se dějí za vědomí člověka. Člověk pak dovoluje si úmyslně a vědomě jazyk měniti velmi zřídka a jenom v případech jistých, když totiž pro nově vyskytlou věc potřebuje také výrazu nového« (Jan Gebauer.) Tím způsobem vznikly svou dobou výrazy: brankář, hasič, hodinář, hromosvod, kopaná, litina, nádraží, očkovati, pojišťovna, směnka, spořitelna, továrna, tužka, vlak, výstava, zasklení, žárovka atd. Možnost takových změn i pro mezinárodní jazyk připouštíme v plném rozsahu; také esperanto, jež chce sloužiti všem vztahům mnohotvárného života moderního, bude nuceno obohacovati svůj slovník, jako národní jazyky, někdy více než tyto. Jazykový výbor vede tuto práci a bude se starati o to, aby pro nové věci, jež lidský duch ještě objevi nebo vytvoří v různých oborech života, vědy, umění a techniky, v čas nalezl vhodná slova! Slovníkově tedy esperanto měněno bude, a to úmyslně a vědomě.

Ostatní změny dějí se v jazyku bez úmyslu člověka, ano bez vědomí jeho. Četné příčiny jejich jsou ovšem při člověku, ale jsou mimo úmysl a vědomí jeho. Proto nazvu je mimovolnými. Postihují hláskový, tvarový i skladbový fond jazyka; ve slovníku působí změn poměrně málo. Nezáleží na jejich příčinách, jichž Gebauer vypočítává šestero. O to běží, zda změny tyto vůbec budou v esperantu možny.

Chceme-li mluvíti o oné námitce, nezapomeňme, že vznik a postavení esperanta jsou naprosto zvláštní a úplně odchýlné od okolností, za kterých se vyvíjel a měnil kterýkoli národní jazyk a že tedy srovnání umělého jazyka s přirozenými není platné pro všechny zjevy a v celém rozsahu.

Vždyť přirozené jazyky šly se svými národy od dob předhistorických až k dnešním a stopy tohoto dlouhého vývoje můžeme dobře pozorovati. Tak čeština s politickým během národa mohutněla a upadala, povznášela se k ryzosti neb pustla. Šly pak jazyky do nedávna libovolně nikým vědecky nepěstěny a neřizeny. Mluvnické a pravopisné zjevy byly neznámy co do příčin a často nastával úplný zmatek. A různé jazyky vyvinuly různé určité stránky mluvnice. Na příklad: proti bohaté koncovkové flexi jmenné v češtině a němčině je francouzština naprosto chudá; kdežto francouzština má přepych pěti minulých časů, musí se čeština spokojiti s jediným; kdežto čeština vytvořila sloveso velmi citlivé

pro dějovou kvantitu a vyvinula smysl pro tvarové odlišení substantiv osobních, živočišných i neživotných, většina jazyků naprosto postrádá tohoto smyslu. A tak vznikly nepravdivosti, složitosti a výjimky, jež působí, že znalost národních jazyků vyžaduje roků. Pak na různost tvarů počala působiti chybná obdoba, jež směšovala kategorie často úplně cizí, čímž nastal zmatek. A právě obdoba, tato hlavní příčina změn, má v jednoduchém esperantu, jež nezná nepravdivosti, pramálo živné půdy. Tak jedna z důležitých záruk pevnosti esperanta, jemuž byla hned do kolébky dána darem vzácná jednoduchost, čímž očkovoáno proti nákaze diferencujících změn.

Esperanto nikdy nepůjde s jediným národem, nýbrž s celým lidstvem a bude tak ušetřeno oněch rušivých změn, které učinily národní jazyky sice svéráznými, ale také složitými a nesnadnými. Kdežto přirozené jazyky prošly se svými národy dobami nízké civilisace, kdy nebylo škol, tisku, dopravních prostředků, na tož akademií a ústavů vzdělávacích, o jazyk pečujících, kdy národově žili bez středisek, bez vědomí i své národní solidarity, šťastné esperanto přišlo teprve do doby, kdy lidstvo je vlastně již mezinárodně upraveno, tvoříc jakousi světovou centralisací, která jen dychtivě čekala na poslední prostředek zblížení, který ještě scházel: jazyk mezinárodní. Našlo v celém světě přívržence a šířitele většinou vzdělané, ochotné pro ně pracovati, přineslo si autoritu svého původce a jazykového výboru, k nimž oddané hledí všichni.

Obraťme se nyní k okolnostem změn v přirozených jazycích a srovnajme je s okolnostmi v esperantu.

Proč vlastně se tolik měnily a nepatrně mění dosud přirozené jazyky? Ne poslední příčinou je stále denní jich užívání v rodině a mezi krajany, osobami to majícími tytéž zvyky, potřeby a mysl. Změny ty jsou věc tak přirozená jako zjev, že předměty brávané do rukou denně a nešetřené spíše se otrou než věci, k nimž saháváme zřídka a opatrně. Esperanto je a bude takovým nástrojem potřeby nikoli denní, nýbrž občasně; nemá se státi a nestane se v žádném místě zeměkoule mateřským jazykem, nýbrž bude se ho užívatí jen příležitostně mezi jednotlivci kmenů a názorů rozličných. Člověk se pak při hovoru s cizincem obyčejně krátkém, zdvořilém a vzácnějším varuje krátiti slova, polknouti slabiku, nedbale článkovati, poněvadž by se mu nerozumělo. Mimo to, poněvadž mezinárodní jazyk je pro

každého »cizí«, mluví se jím pomaleji a zřetelněji než mateřštinou, člověk se více namáhá, aby náležitě vyslovoval a srozumitelně, opravdu mezinárodně vyjádřil svou myšlenku.

A kdy se prováděly jazykové změny v národních jazycích? Z toho, co řečeno nahoře o zásadním rozdílu mezi jazyky národními a esperantem, odpovéd' vysvitá. Všecky jazyky dnešních kulturních národů měnily se hlavně v době staré a tehdy rychleji než v dobách pozdějších, kdy náklonnost k změnám byla rušena a zdržována ustáleným ústředním jazykem spisovným v literatuře, školou a církvi, životem veřejným a jinými činiteli. Jakmile národ uzná nějaké město za své politické a kulturní středisko, jakmile povýší jedno z nářečí za spisovný jazyk, což se dělo často vlivem významného spisovatele, zejména pak jakmile v ustáleném tom jazyce počne tisknouti knihy, čímž je zlacňuje, rozšiřuje a tak dává svým dětem, vnukům i pravnukům do rukou vzory a předlohy jazykové, mluvnické a pravopisné, v těch dobách klesá význam nářečí ostatních a zaráží se i měnlivost jazyka národního vůbec. Příklady najdeme v historické mluvnici a literatuře všech národů. Proto pozorujeme v češtině mnohem více a daleko významnějších změn od století 13. do 15., než od 16. stol. do naší doby. Mluva Komenského se nemnoho liší od naší, kdežto od jazyka 14. století nesmírně.

Dnes jazyky národní se mění pramálo a esperanto se bude měniti ještě méně. Neprošlo dobou tápání; vystoupilo hned jako hotové, autor postavil mluvnický a slohový vzor ve Fundamentu, jímž se řídí esperantisté celého světa. Nebylo nejistoty, volby a nevráživosti; »nejkrásnější vynález 19. století« během dvaceti let zvítězil.

Také vyhlídka pro jazykové změny je slibnější v národních jazycích omezených na území a státy než v esperantu rozšířeném na celé zeměkouli.

U koho začíná a jak se šíří jazyková změna? »Začátek svůj běře jazyková změna v mluvě jednotlivcově«. (Gebauer). Tu vzniká jako odchylka a novota, odtud pak se šíří asi takovým postupem jako případné rčení nebo přísloví do nářečí jednotlivcova, někdy zaniká, jindy, má-li na sobě ráz výhodnosti a úspory, ujímá se a stává se pravidlem. To je při menším počtu a blízkosti jedinců národa žijícího na souvislém území snažší než v esperantu, kde každá novota bude musit najíti napodobitele nejen ve své zemi, ale i v celém

světě, aby byla přijata. A tu jsme u otázky hranic jazykových změn.

Kam až zasáhly jazykové změny? Většina změn, zejména v dobách předhistorických, provedla se arci úplně, ale mnohé změny prorazily jen na územích omezených, zejména ty, které začaly v dobách, kdy jazyk spisovný už vykonával udržující vliv. Na příklad české přehlásky *daj-dej, dušu-duši*, provedly se jen v Čechách a na západní Moravě, v nářečích východomoravských a slovenských však se neprovedly. Můžeme-li se odvažití soudu o budoucnosti esperanta na základě minulosti národních jazyků? Podle něho by změny těžce začínaly a nezvítězily ani v dosti osamocенých spolicích úplně.

Jak rychle se prováděly jazykové změny? Z historické mluvnice vidíme, že většina změn se prováděla v časových dobách velmi dlouhých. Vzácné jsou změny, které se vykonaly za jedno neb dvě pokolení. Tak v češtině klesání *jotace* trvalo asi půldruhého století, stejně dlouho změna *bóh-buóh-bůh*; změna *súd-saud-soud* začala na konci 14. století, tvar *soud* se vyskytuje sice již v 15. století, ale *saud* se houževnatě drželo v písmě až do 19. století.

Dnes před našima očima se jazykové změny mimovolné vůbec provádějí pomalu. Co se týče esperanta, je vyloučena obava, že by se prováděly rychleji. Tištěné slovo, jež tolik působilo na zastavení změn v národních jazycích, bude mít v esperantu ještě větší konservující vliv, kongresy a čilý styk ojedinelých esperantistů budou pak působiti vyrovnávacím způsobem. A kdyby i esperanto se změnilo za života čtyř neb pěti generací, zdaž by ony generace neměly mu býti vděčny, že jim posloužilo, jako nám už slouží.

Jaký je konečně osud nářečí v národních jazycích? U dnešních národů s průměrnou civilisací, majících školství a literaturu, nářečí nejenom už nevznikají, ba ubývá jich. A co hlavně přispívá k omezení jich? Je to 1) škola s učebnicemi tištěnými ve spisovném jazyce 2) úřady 3) denní tisk a časopisectvo 4) příliv z venkova do městských středisk za vzděláním, výdělkem, zábavou, vojenskou službou atd. Tam ve velkých městech většina venkovanů ať ráda či nerada, ať úmyslně či mimovolně zapomíná na rodné nářečí a přispůsobuje se.

V esperantu tisk z ústředí, učebnice a publikace často samým Zamenhofem schválené, rozšíření esperanta hlavně ve větších městech udrží jeho jednotu, zastaví změny a tím i za-

mezi nářečí. Jednota tato vůbec bude udržována tím snadněji, čím rychlejší pokroky dělají prostředky dopravní a čím častěji a důvěrněji se budou stýkati esperantisté všech částí světa.

Nechť se esperantisté nikdy nelekaří strašáků postavených skeptiky. I bez skvělých výsledků dosavadní práce sama povaha esperanta je zárukou úspěchu.



ORGANISACE PRAKTICKÉHO UŽÍVÁNÍ ESPERANTA.

O *«Universala Esperanto-Asocio»* píše Dr. Stan Kamaryt.

(Dokončení).

Organisace svazu U. E. A. je taková: V každém místě neb kraji, kde je aspoň 20 členů svazu, volí si tito na dvě léta jednoho delegito a případně i vicedelegito. V místech a krajích, kde není 20 členů, ustanoven je subdelegito, který je jmenován a podřízen nejbližšímu delegito a stává se delegito, když shromáždí kolem sebe aspoň dvacet členů. Delegitoj (v jich zastoupení vicedelegitoj), respektive subdelegitoj, zastupují členy svého místa neb kraje jak před výborem, tak před veřejností, jsou ve stálém styku s výborem, starají se o provedení jeho přání a plánů, o zavádění a užívání všech služeb, jež U. E. A. svým členům nabízí, účastní se hlasování o všech záležitostech administrativy a přijímají přihlášky a členské příspěvky členů i ostatní platy pro U. E. A. Sami zvolí si ve svém místě nebo kraji spolupracovníky, jimž dle osobních schopností a postavení přidělují určitý obor působnosti a jimž také záležitosti v jich obor spadající předávají k vyřízení. Takový odborný pomocník jmenuje se konsulo. Úkoly mezi konsuloj rozdělené jsou dosud tyto: konsulo por ĝeneralaj informoj stará se o záležitosti turistické, o cizí návštěvníky a poskytuje všeobecné informace o své krajině, konsulino por virinoj je rádkyní a pomocnicí cestujících žen, jimž poskytuje informaci a pokynů, konsulo por komerco kaj industrio bývá schopný odborník, který podává informace o místních poměrech obchodních a průmyslových, o obchodních a firmách, jež jsou členy U. E. A., a obstarává překlady obchodních dopisů (menší zdarma, větší za mírný po-

platek), konsulo por junuloj bývá obyčejně profesor nebo učitel, který udílí informace mládeži, zejména studentům, dhá o ně za pobytu v městě atd.; ve městech přístavních bývá také konsulo por maraj aferoj. Veškeré služby poskytují všichni zástupci zdarma za pouhou náhradu poštovního, případné hotových výloh.

Ústřední správa spočívá v rukou gčlenného výboru, který delegitoj volí vždy na 2 léta a jehož členové rozdělí si mezi sebe správu jednotlivých odborů. Výbor je s delegitoj ve stálém styku zvláštními tištěnými oběžníky, tvořícími »Bulletin de U. E. A.«, se všemi pak členy sprostředkuje styk oficiální orgán čtrnáctidenník »*Esperanto*« vydávaný v Ženevě. Vedle výboru je vyšší spolková rada (Alta konsilantaro), do níž výbor jmenuje vynikající osoby, které mohou mu býti prospěšny svými zkušenostmi, radami nebo autoritou; počet jich nesmí přesahovati dvacetinu delegátů. Členy spolkové rady jsou: Dr. Ludvík Lazar Zamenhof, tvůrce esperanta, E. Boirac, rektor dijonské university, předseda Esperantské akademie a Jazykového výboru esperantistů, dr. Mybs, předseda svazu německých esperantistů, plukovník Pollen, předseda svazu anglických esperantistů, a generál Sebert, předseda stálého výboru esperantských kongresů. Členy výboru jsou: red. H. Bolingbroke-Mudie (předseda), redaktor H. Hodler (správce odboru: administrace), Th. Rousseau (finance), A. Charles (konsulové), P. Blaise (informační kanceláře), J. Schmid (turistika), Dr. M. Kandt (obchod a průmysl), F. Rockmann (mládež), prof. G. Roy (vzduchoplavba). Adresa U. E. A. je: Esperantio, Genève, rue Bovy-Lysberg 8, Svisio.

Členem U. E. A. může se státi každý, kdo souhlasí se stanovami svazu, přihlásí se za člena (buď u delegito, resp. subdelegito svého místa nebo u ústředního výboru) a zaplatí roční příspěvek (ten na r. 1909 jest 36 sd = 86 h pro jednotlivce, 2 Sm = 4'80 K pro firmy), z něhož jednu třetinu podrží si delegát a dvě třetiny obdrží ústředí. Každý člen obdrží legitimaci, podepsanou předsedou U. E. A. a příslušným delegito, resp. subdelegito, která ho opravňuje používatí všech služeb, jež U. E. A. poskytuje, obraceti se tedy na všechny zástupce U. E. A. v celém světě, účastniti se volby zástupce a podávati stížnosti na zástupce, kteří by snad jeho přáním nevyhověli.

U. E. A. je podnik mladý, ale dohívá rychle půdy. Dle stavu ze dne 15. května 1909 je U. E. A. zastoupena

v 560 místech 43 zemí. Má 2.900 členů (esperantianoj), 200 delegitoj, 89 vicedelegitoj, 378 subdelegitoj, 395 konsuloj, 108 Esperanto-oficejoj. V Čechách a na Moravě má své zástupce v těchto místech: v Brně, Čes. Budějovicích, Bystrici p. Hostýnem, Hradci Králové, Kardašově Řečici, Lomnici n. Pop., Mor. Ostravě, Plzni, Praskačce, Praze, Prostějově, Strážku, Táboře, Těšeticích a Žižkově. Čeští intereseanti v místech, kde není zástupce, obdrží informace od pražského delegáta p. Vojt. Krause, magistrátního adjunkta (Praha-I. 320., ul. Karolíny Světlé č. 21).

Uvážíme-li, že v krátké době jednoho roku U. E. A. pronikla do nejrůznějších míst celého světa, takže nechybí na př. ani v Tokiu, Charbinu, Bombaji, Aidinu, Smyrně, Tomsku, Tunisu, Oranu, Durbanu, Rio de Janeiro, Buenos Aires, Lapidě atd., nahlédneme, že pro tuto mezinárodnost a rozšířenost její mohou služby, jež nabízí, míti značnou cenu i význam.

Toť v krátkých rysech obraz pokusu o provedení mezinárodní organizace k praktickému cíli. U. E. A. má členům poskytovat hlavně praktické služby. Neslibuje nemožností a realizuje své plány postupně jak rostou její prostředky. Nadšení a pracovitost jejich vůdčích lidí jsou krásné a úctyhodné právě pro svou vytrvalost a nebojácnost. Nové hodnoty kulturní tvoří se zde aniž lze dobře pozorovati tempo jejich pokroku. Ale to je právě charakteristické pro vzrůst civilisace. Lze jen s radostí pozorovati vzrůst díla ženěvských pracovníků a těšiti se na úspěchy, které očekávají.



SIGNIFO DE LA ESPERANTISMO EN LA KULTURA EVOLUCIO.

Speciale por «Český esperantista» boheme verkis D-ro Frant. Křejčí, profesoro de filozofio en la bohema universitato de Praha. El la bohema manuskripto en esperanton tradukis H. K. Bouška.*)

Mi ne estas esperantisto — estus senbezone citi la kaŭzojn, ili estas tute okazaj. Sed ĝuste pro tio oni ne povos jam antaŭe fari al tiuj ĉi linioj la riproĉon pri la antaŭjuĝemo.

*) Represo de la artikolo estas permesata, se oni citas plenan adreson de «Bohema esperantista» (Praha III. Kampa 495, Bohemujo) kaj sendas al nia redakcio tri ekzemplerojn. Bohema traduko de la artikolo estas rezervita.

Mi ne estas esperantisto, sed mi ĉiam simpatiis tiun ĉi movadon, antaŭe senkonscie kaj nun, kiam mi ĉion konsciis, el la konvinko, Mi sciis, kion oni ĉu serioze ĉu moke diradis kontraŭ la esperantismo, mi estis komprenanta la indignon de filologoj kaj estetikistoj, kiuj malakceptis artefaritan neorganikan neologismon kvazaŭ ĝi estus propravola, senmotiva difekto de la natura laŭleĝemo, el kiu fontas ĉiu beleco kaj celhavo; mi eĉ konfesas, ke la miksaĵo de gramatikaj kaj leksikonaj elementoj, el kiuj esperanto estas kreita, elvokanta same senordan miksaĵon de eĥoj el la lingvoj al mi konataj, ne plaĉis al mia gusto. Praktika vidpunkto, al kiu nia epoko tiel facile oferas ĉion »ekskluzive idealan«, ne estus seniginta min de tiu ĉi antipatio, kaj ne estus klariginta al mi, kio simpatiigis min por esperanto. Mi ne respektas la devizon »la celo sanktigas la rimedojn«, eĉ se la celo estus la plej nobla, tiom malpli tie, kie sub la praktika konsidero kaŝas sin aŭ povas sin kaŝi tute ordinara profitemo en komercaj spekulacioj.

Sed en la penado pri tutmonda interkompreniĝa rimedo mi eksentis gravan edifantan momenton: etikan kaj tiu ĉi klarigis al mi ĉion.

La esperantismo — en la pli ĝenerala signifo kiel nomo por klopodo pri tutmonda lingvo — havas la fonton en tio, kio kreante la esencon de la homeco estas la ĉefa risorto de la kultura evolucio, ĉar jam la sola peno pri komuna interkompreniĝilo estas pruvo, ke al ĉiuj homoj estas io komuna. Tio konatiĝas sole kiel komunaj interesoj, sed komunaj interesoj estas eksponentoj de komunaj bezonoj, komunaj bezonoj estas eksponentoj de samaj internaj vivokondiĉoj kaj egalaj internaj vivokondiĉoj estas indekso de la sama substanco. Komunaj interesoj proksimigas la homojn, kaj ju pli multenombraj ili estas, des pli efike ili paralizas tion, kio la homojn disigas kaj malamikigas reciproke. Per la konscio de komunaj interesoj konsekvence malgrandiĝas la egoismo; kaj kio helpas al tio, tio jam pro tio estas movigilo de la moraleca evolucio, kunkondiĉo de la morala nobligo. Tia afero estas etike rajtigita, la penado por ĝi ricevas signon de idealeco, kaj praktika vidpunkto, en kiu eventuale — kiel ĉe esperanto — estas rigardata la plej proksima motivo de la rajtigo, ne povas detiri tiujn penadojn en la trivialecon de materiala profitemo. La penadoj de la esperantismo iras pli supren, kaj kiu ne konsentos kun teoria dedukto, al tiu diros tion la historio de tiuj penadoj.

El ĝi estas videble, ke la ideo pri la lingvo universala naskiĝis kaj kreskis sur la sama vojo, sur kiu naskiĝis kaj kreskas la ideoj kreantaj komponentojn de la nuna stadio de kultura evolucio de la homaro kaj difinantaj ĝian estontecon. La ideo pri universallingvo naskiĝis per la natura neceseco kiel organika konsekvenco de la ĝenerala stato de la homara korpo sociala, kiel la ideo pri homa universalanimo. Antaŭe ĝi ekbriletis sporade en la kapoj de eminentaj individuoj, kiuj per la disvolviĝo de siaj spiritalaj potencoj antaŭiris siajn samtempulojn kaj ĝisrigardis pli malproksimen en la etontecon. Poste ĝi aperadis pli ofte, ĝis ĝi, ekokupinte grandan nombron da kapoj en diversaj partoj de la mondo, ĉe diversaj nacioj, en diversaj sociaj cirkonstancoj, kunigis ilin al komuna laboro por sia efektivigo.

Tiu ĉi organika procedo malebligas la opinion, ke la ideo de universallingvo estus sole ĥimero de fanatikaj, per unuflanka fervoreco ekscititaj cerboj, aŭ ke ĝi estus aventura ideo devenanta el la racio regata de fantazio, kio ambaŭ estus abnormalaj ekstremoj nekapablaj kreski plu. Kompreneble aperas ankaŭ tiaj ĥimeroj kaj ekstremoj sporade kaj kun ia periodeco; la diverseco de la evolucio donas la okazon por ripetado de egalaj aŭ similiaj sencensaĵoj; sed neniam sur supraĵoj, sed sole sur malsupraĵoj de la kulturo. Ideojn, kiuj kiel ajn ŝajnus al iu aventuraj, aŭ ni mallonge diru utopioj, kiuj aperas en la sama esenco jen ĉe Platon, jen ĉe Spinoza aŭ Kant ktp., neniu taksos nesufiĉe, se li ekpensos, ke granda spirito per sia evolucio anticipas la evolucion de la homaro ĝenerale.

En tiu ĉi rilato la esperantismo povas fiere montri sian genealogion. Kio povis naskiĝi en cerbo — por citi sole kelkajn el la plej konataj okazoj — de ia Leibniz, Komenský kaj por kio povis ekflami en nia epoko Spencer, tio certe enhavas kernon sanan kaj kapablan evoluigi plu, tio meritas esti efektivigita per komuna klopodo de la homaro.

El tio rezultas mia konvinko, ke la penadoj pri tutmonda lingvo, kiel ili montriĝas per movado esperantista, havas pli profundan signifon ol kian oni aljuĝus al ili laŭ la celo plifaciligi la internaciajn rilatojn. Eĉ, se ili montriĝus en tiuj ĉi rilatoj nesufiĉaj, la proksimiĝo de la nacioj kaj pionira laboro en servo de la humaneco restus daŭranta profito. Sed ankaŭ tiu ĉi praktika celo, al kiu esperanto marŝas, aperas en alia, pli simpatia lumo, se oni rigardas ĝin el la vidpunkto de naciaj konfliktoj. Universala lingvo, aŭ, se vi volas, tutmonda

interkompreniĝilo, absolute forigos la ĵaluzon kaj konkuron inter la grandaj nacioj penantaj per disvastigo de sia lingvo realigi sian superecon en ĉia ajn rilato, kaj ĝi forigos la timon de mapli grandaj kaj mapli fortaj nacioj antaŭ la sekvoj de konkurado kun la pli potencaj sur tutmonda forumo. Hodiaŭ estas rigardataj tri kvar lingvoj kiel tutmondaj en la senco, ke oni posedante iun el ili povas trairi la mondon, ĉar publikaj institucioj por internaciaj rilatoj estas faritaj (en la senco altruditaj) kun respekto al la membroj de tiuj privilegiitaj kaj kiel egalvaloraj rigardataj nacioj. Fatala afero, kiu povas malkuraĝigi la anojn de mapli grandaj nacioj kaj aliflanke doni la kaŭzon por ilia perfortado. Kiel tute alie estus, se la internaciaj rilatoj estus praktikataj per esperanto!

Ĉiuj kontraŭdiroj kaj ĉia antipatio kontraŭ penoj pri lingvo internacia, malaperas, se oni ekspensas la rolon, kiun esperanto povus havi — kaj mi esperu, havos — en lingve naciecaj malpacoj, kiuj ne donas al la homaro trankvilon en la kultura laboro! Esperanto senbezoniĝos neniun lingvon; ĝi ne faros pretendojn estantajn super la fako de ĝia rajtigo — fari poemojn en esperanto kontraŭstaras la ideon pri esperanto kaj ideon pri poezio. Esperanto neniel malhelpos kulturen evolucian, sed ĝi komplementigos ĝin en la direkto, en kiu povas naskiĝi beno por la homaro.



PRI LOKA PROPAGANDO DE ESPERANTO.

Rezonas *prof. PhC. Vojtěch Novotný-Žolenský.*

— Estas nedisputeble, ke en loka propagando de esperanto ni bezonas kaj devas uzadi ĉiujn rimedojn, helpilojn kaj vojojn jam ĝenerale provitajn, konatajn kaj uzatajn, sed estas ankaŭ certe, ke ni bezonas uzi kaj respekti ĉiujn lokajn rilatojn kaj cirkonstancojn. Kio en unu loko montriĝas taŭga, tio sama en aliaj lokoj povas havi malajn sekvojn. Sekve estas necesege por la propagandantoj kaj apostoloj de nia brila ideo, ĉion bone antaŭpripensi, pristudi kaj trarigardi por eble ne pli malutili ol utili al nia afero — eĉ malgraŭ »bona fide«. Oni bezonas, kiel kampistoj, tre bone koni niajn teron kaj fundon, por ke nia laboro havu deziratajn kaj atendatajn sekvojn.

Kion ni devas — laŭ mia modesta opinio — memori en loka propagando de esperanto, mi volas montri per tiu ĉi artikolo laŭ la rilatoj kaj cirkonstancoj en la urbo, en kiu mi vivas (sudbohema urbo Pisek).

— Ni ne estu optimistoj! Ni ne komencu la propagandon kun atendo, ke ĉio bone prosperos pro tio, ĉar esperanto estas jam afero komune bontrovita kaj aliloke triumfanta. Kontraŭe. Ni estu preparitaj suferi multe da moko, ŝercoj, trompoj kaj ofendoj! Ĉar ankoraŭ multaj homoj, eĉ kleruloj, rigardas mian aferon kiel efemeran ĥimeron post iom da jaroj pereota, kiel volapük.

Ni rigardu la aferon tute flegme kaj reale! Ni memoru (kaj ni konfesu al ni), ke esperanto por la plimulto da homoj ĝis nun ne donas grandajn profitojn kaj ke ĝi ne povas (en Bohemujo) tro allogi la junularon tro ŝarĝitan per studoj lingvaj! Ni ne tro revu!

— Ni ne estu egoistoj! Grava cirkonstanco. Ni ne komencu la propagandon kun intenco nin superigi, por ke niaj nomoj brilu en gazetoj kiel la nomoj de homoj penantaj distingiĝi kaj superiĝi, ĉar en tia okazo niaj kontraŭuloj mokas, kalumnias, ridindigas nin kaj ne sole nin, sed ankaŭ nian entreprenon.

Ne estas bone, se en la frunto staras persono, por kiu la instruado de fremdaj lingvoj estas profesio. La kaŭzo estas klara. La malamikoj, enviantoj, mokantoj kaj malfidemoj montras, ke tia persono subtenas la aferon ne pro tio, ke ĝi estas bela kaj bona, sed ke ĝi alportas profiton al ĝi mem, ke ĝi alportas al ĝi laŭdon, gloron, admiron kaj adoron.

— Kiel komenci la propagandon? Plej frue estas rekomendinde vekti la intereson kaj scivolon per senpaga disdono de granda nombro da propagandaj flugfolioj. La flugfolioj estu donataj senpage, ĉar multaj personoj preterlasas la aferon sole pro tio, ke ili ne bezonu elspezi monon; estas multaj personoj, kiuj bedaŭras laboron kaj monon por skribe peti la informojn (ekzemple la sendon de esperanto-ŝlosilo proponata en la gazetoj). Nur post kiam la intereso kaj scivolo estas tiele vekita, estas dezirinde baldaŭ profundigi ilin per publika kaj senpaga parolado.

— La persono staranta en la frunto de loka propagando, la ĉefo, la estro de loka propagando estas tre grava kaj influa afero. Tiu persono devas esti ne sole entuziasmo, malprofitema propagandanto, sed estas bezone, ke ĝi havu personajn kaj diplomatajn ecojn, ĉar ĝi respondas pro

ĉio, ĝi rilatas kun la oficoj, ĝi donas la rekomendecon al la tuta entrepreno. Ĝi devas esti homo societa, humora, parol-ema, galanta, simpla, konanta ofican funkciadon kaj societan direktadon. Plej bone — evidente — estas, se ĝi estas viro — virino ne imponas al ĉiu — okupanta altan ofican aŭ socian pozicion, viro reputacie bonfama kaj senmakula kaj amata. Bedaŭrinde ne estas al ĉiu loko donita la feliĉo havi tian estron, tian homon . . .

— Kurso pri esperanto devas esti senpaga. Se la persono aranĝanta kursojn pri esperanto instruas por kaj kun honorario, tiam — laŭ mia opinio — la propagando ĉesas esti ideo entuziasma kaj ideala, kio povas malutili al nia entrepreno. La ĉefaj kondiĉoj por kurso pri esperanto estas: ĝi estu senpaga, ĝi estu en ĉambro de komunuma lernejo, ĝi estu amuze kaj pedagogie direktata!

— Varbado de samideanoj devas esti sistema. Unue, plej frue kaj ĉefe, ni varbu ilin inter aroj de tiuj, kiuj plej facile estas akireblaj, tio estas, inter tiuj, al kiuj la ellerno de esperanto donos materialan profiton. Due inter tiuj, kiuj plej facile ellernos ĝin. Komercestaro kaj studentaro. Plej frue estas bezone almiti komercajn kaj industriajn lernejojn. Poste gajni direktorojn de mezogradaj lernejoj. Necese estas — tio ĉe ni mankas — ekligi interrilatojn kun komercistoj, kaj aranĝi por ili specialan kurson senpagan. Varbado de maljunaj sinjoroj ne estas bezona, ĉar ĝi estas pli mapli senefika.

— Propagando per preso, en lokaj ĵurnaloj, ne estas tiel grava kiel oni juĝas. Tro ofta ripetado trivialigas la aferon. Plej bone estas publikigi iom da artikoloj kaj provoj, kiel oni ordinare faras. Sed absolute nerekomendinde estas troa promesado pri eklerno de la lingvo, pri ellerno en iom da horoj ktp. Ni mem certe scias — mi havis la okazon sperti tion dum ok jaroj — ke ne estas vere, ke estus facile ellerni esperanton el libroj en kelkaj horoj. Publikigi en loka gazeto esperantan rubrikon estas propagandilo sendube bona, kaj ĉe ni estas sufiĉe da okazo, ĉar redaktoroj estas sufiĉe komplezaj kaj bonvolaj; sed — mankas laborantoj!

— Konversacio en esperanto — tio estas problemo de provincaj samideanoj, problemo same interesa kiel mal-facile solvebla, kvankam en Praha ĝi jam longe estas solvita. Konversacio estas afero tre grava, ĉar alie oni senenergiigas malgraŭ ĉiu entuziasmo kaj nia entrepreno ekdormas, dormetas kaj dormetos. Por allogi al la konversacio estas necese kunigi la utilon kun egrableco kaj novaĵoj, aranĝadi

do konversaciajn vesperamuzadojn kun teo, amuzajn kaj interesajn ekskurzojn en najbarajn lokojn. Bedaŭrinde ne ĉie tio estas eble — ekzemple ĉe ni (en Pisek). Se la societo estas sole unuseksa — kiel en Pisek, kie ĝi estas preskaŭ ekskluzive virina — ĉiuj tedas, eniĝas kune, ĉiuj baldaŭ ekĉagreniĝas. Tia societo baldaŭ malsupreniĝas: inter virinoj regas senenhava babilado, rakontado, eĉ kalumniado, inter viroj ordinara restoraciaj ludoj, eĉ drinkado. Ni zorgu, ke kunvenadu societo gesinjota, ambaŭseksa, amuze lernanta. Vere en malgrandaj urboj naskiĝas danĝero: urbataj babiladoj — ordinare malpravaj — pri suspektenaj kunvenadoj kaj el tio rezultanta malpermeso de patrinetoj — sed estas malfacile plaĉigi sin al ĉiuj.

— Esperantista klubo estu fondita laŭeble baldaŭ; ĝi estas bona kaj utila por abonit revuojn kaj disvastigi la rilatojn. Sed ĝi devas havi membrojn verajn kaj fidelajn. Tial: ne fondu la klubon pli frue ol ni estas esperantistoj kaj fondu la klubon nur kaj sole tiam, kiam estas sufiĉa nombro da ni (almenaŭ 25!)! Kontraŭ tio estas multefoje farata grava eraro, ĝi estis farita antaŭ iu tempo ankaŭ ĉe ni. Ŝajnas al mi, ke en la komencoj povas bonege sufiĉi sole amikaj kaj amuzaj rondetoj, sed rondetoj amikaj kaj konkordiaj! Se en urbeto ne estas ankoraŭ kondiĉoj kaj fundamentoj por klubo, nature ĝi ne povas prosperi kaj kreski, ĝi povas sole viveti. Sekve ni zorgu esplori ĉiujn cirkonstancojn pli frue ol ni pligrandigos la nombron de kluboj!

— Sidejo de klubo aŭ societo estas afero ne malgrava. Ĝi, kiel natura centro de klubana vivo, estas videble kaj certe bezoniga afero kaj propagandilo. Sed kia kaj kie? Sendube klubejo aŭ societejo devas kontentigi bezonojn kaj postulojn pri komforto por ke oni povu tien enkonduki eĉ personojn kaj gastojn de grandranga societo. Plej bone estas elekti — almenaŭ por iu tempo kaj se estas eble — unuarangan hotelon en loko, por ke jam klubejo estu alloganta (estas urbataj filistoj tiamaniere kapteblaj). Tiaokaze estas eblaj ankaŭ sukceso kaj progreso.

— Allogiloj por neesperantistoj estu belaj kaj realaj provoj de praktikeco, utileco, sukceso de esperanto. Ni rilatiĝu kun fremduloj kaj ni diskonigu la rezultatojn de rilatoj kun ili per gazetoj, ekspozicietoj k. s., ni atentigu la publikon pri ĉio, kion ni gajnas per esperanto!

— Grava kaj rimarkinda afero estas: Ni ne laciĝu! Ni laboru kaj esperu! Ni iru antaŭen! Kaj ni venkos.

ANTIKA ROMA.

El »*Rim*« de J. S. Machar.

Kial vi rigardas ankoraŭ nun la tempon antikvan tian kian ĝin pentras al vi malicaj pastroj, frenezaj poetoj, sentimentalaj filozofoj kaj nejuĝemaj pentristoj?

Ĝia lukso? Ĝi ne estis tiel eksterordinara, kiel ŝajnus. Nek en manĝaĵoj, nek en trinkaĵoj. Trimalĥio de Petronius estas priskribata satire kaj fama Lucullus malfermegus hodiaŭ pro mirego la okulojn, se li venus kiel gasto al ekzemple sole fasta manĝado en iu monaĥejo. Legu leterojn de Plinius pli juna — se la reveno al la natureco, kunigo de la lukso kun ŝparemo kaj kun matematiko, amo al la naturo kaj zorgo pri la pureco de la korpo, se ĉio ĉi estas simptomo de la ruiniĝo, do tiam la tuta roma imperio estis tro ruiniĝanta. La lukso en vestado estas ĉe ni, ĉe l'papo, kardinaloj, episkopoj, prelatoj, soldatoj, modamaj sinjorinoj, dandoj, sed ĝi ne estis en la antikva epoko, ĉar togo estis solena vesto same de l'imperiestro kiel de la plej malriĉa Romano. Kaj nudeco, kiun modernaj kaj nemodernaj pentristoj tiom amas montradi sur siaj antikvaj pentraĵoj, estis en la mezepoko dum solenaj bonvenigoj al imperiestroj kaj papoj, sed ne en Roma antikva. Jam Cicero diras: »Prave diris Ennius: Nudiĝi antaŭ alia ŝtatano estas komenco de malnobleco«. Nenudiĝis viro, nenudiĝis virino. Forlasu sekve ĉiujn nudajn belulinojn sur pentraĵoj de Siemiradzki. Gerom k. a. Car ili ne estas veraj, ili ne ekzistis. Kaj orgioj de seksa instinkto? Neniel ili estis pli grandaj ol estas orgioj de kiu ajn hodiaŭa urbego. Kontraŭe. Jam per tio, ke antikvetempaj satiristoj tiel montras ilin ĉe apartaj homoj, estas pruvite, ke ili ne estis kutimo kaj tradicio. Ke tiuj homoj vivis pli proksime de l'naturo, sen hipokriteco kaj farizeeco, tio povas ja esti ilia fiero. Ili vivis pli proksime de ĝi, ĉar ili amis ĝin, rilati kun ĝi estis ilia neceso.

Sed antikva sklaveco? kontraŭdiros eble delikataj animoj kristanaj. Vidu do servuton de kamparanoj sur bienoj pastraj kaj landsinjoraj, sklavecon de servutuloj en Ruslando, sklavecon de ĉiuj kamparanoj en la tuta kristana Eŭropo. Cetere, antikvepoka sklaveco estis kruela sole dum kelkaj periodoj de respubliko kaj sole sur kelkaj lokoj ekzemple sur Sicilio, kie oni faris plantejajn laborojn; sed en Roma? Ĉu iu scias imagi, ke ankoraŭ avo de Horacius estis sklavo kaj Horacius jam amiko de l'imperiestro Augustus? Ke

gepatroj de Diocletianus estis gesklavoj kaj ilia filo la plej granda roma imperiestro? Kaj kiu el tiel nomitaj liberaj laboristoj ne interŝanĝus hodiaŭ sorton de bone prizorgita roma sklavo? Oni tradukas la vorton »servus« per la vorto sklavo, sed oni donas al ĝi signifon, kiun ni memoras el plantejaj rakontoj de bona Germano Nieritz . . .

Sklaveco . . . Kaj se eĉ sklavecon fizikan, sed tian sklavecon kaj sklavigon de l'spirito, kian alportis al la homaro kristaneco, antikva tempo ne konis. Libera homo, kiu estas lasta sonĝo de niaj tagoj, vivis kaj plenvivis en ĝi sian vivon . . .

Inter la malriĉuloj kaj la riĉuloj ne estis tia abismo kiel hodiaŭ. Riĉuloj donadis sendevige pro bono publico ne sole tion, kio superfluis, sed ankaŭ tion, kion ili bezonis. Ili faris ludojn, festenojn, banejojn, lernejojn, bibliotekojn, donacojn. Kaj ili donadis tiel, ke modernaj mecenoj ankoraŭ hodiaŭ povus lerni de ili. Kaj oni ne nomis tion bonfareco kaj oni ne promesis pro tio ĉielan regnon post la morto.

Sed gladiatoroj? Sapiro vidi freŝan homan saĝon? — Kiu tiel demandas? Tiu delikatsenta moderna homo, kiu hodiaŭ pere de sia ĵurnalo ricevas porcion de homa sango en ĉiutagaj sciigoj pri akcidentoj kaj malfeliĉaĵoj, en telegramoj kaj priskriboj de batalejo tute egale, kiel ĝin senpere ricevis antikva Romano en cirko kaj areno? Homo apartenas en fakon de rabobestoj kaj bezonas sangon kaj mortigadon — tion oni neniel povas nei, kaŝi: ĝi mortigas bestojn dum ĉasado, kun plezuro ĝi enspiras odoron de sango de siaj proksimuloj, disverŝitan en ĵurnaloj, kaj se ĝi povas iun mortbati, ĝi mortbatas lin, kompreneble sole per maniero nesanga, ĉar sangan manieron, se ĝin uzas individuo, punas paragrafoj . . .

Ne, tiuj homoj estis nek tiel malsaĝaj nek tiel malĉastaj, kiel ili estas preparolataj maljuna Mommsen, la plej granda konanto de antikva Romo, traŝe diras: Roman imperion oni pli multe insultas ol konas . . .

El la bohema lingvo tradukis *Rud. Hromada*.



KIEN ĜIN DONI?

Felietono de *Jan Neruda*. El la bohema lingvo tradukis *ing. J. Vostatek*.

Ĉu la leganto estis jam iafoje frumatene sur la strato? Mi ne intencas ofendi la leganton, mi scias ke la leganto

estas nobla kaj ne bezonas leviĝadi antaŭ la naŭa — sed povus okazi hazarde!

Kaj, se la hazardo irigis lin pli frue el la hejmo, li en sia konata sagaceco certe rimarkis, ke sur la strato estas ne sole homoj, sed ankaŭ objektoj, kiuj ne estas tie vidataj alitempe. Kaj same estas ankaŭ neniu dubo ĉe lia konata spritpleneco, ke li pri tiuj homoj kaj objektoj, sed precipe pri la objektoj poste meditis. Jen apud domo staras malnova kruĉo. Jen sur la rando de trotuaro staras rompita hotelo. En la mezo de strato kuŝas bakpato. Kiel tiuj ĉi objektoj venis tien? Ĉu ili eliris nokte el la negardataj ŝrankoj kaj ne trovis returnan vojon, kiam krepuskigis? Ĉu ili hazarde perdis sian kuiristinon matene aĉetantan kaj nun atendas tie ĉi kiel bondresita hundo, kiu restinta sola sidiĝas eĉ en la mezo de strato kaj ĉirkaŭrigardas ĝis ĝia mastro retrovos ĝin?

Nu bone. Nuntempe oni parolas pri la Ĥolero kaj pri la preparoj kontraŭ ĝi — mi petas la leganton, ke li ne interrompu min, ke li ne demandu, kiel tio interrilitas kune — li lasu min trankvile skribi kaj skribi, fine li tamen ekvidos, ke mi ne parolas tro malsaĝe. Do: oni parolas pri la Ĥolero. Kion oni devas ĉion fari, por eviti ĝin. Antaŭ ĉio: pureco de loĝejo valoras duonan sanon. Desinfektado de aero estas ankaŭ duona sano. Sendifekta bovaĵo, porkaĵo estas ankaŭ duona sano. Bona biero de Plzeň havas egalan valoran. Summa summarum: Se oni precize atentis ĉiujn instruktojn, oni laŭdire estas en la tempo de la Ĥolero du kaj duone pli sana ol estas bezone. Sed kial mi ne atentus laŭvorte la instruktojn, se a) ili utilas al mia sano, b) se la plenumado de policaĵ ordonoj plenigas min per nedirebla ĝojego!?

Tuj kiam mi tralegis sur la plej proksima afiŝejo koncernantan ordonon de la magistrato, mi interrompis mian promenadon kaj revenis hejmen. Nu, mi pensas, tie ĉi estas sufiĉe pure. La planko kaj ilaro estas sub senĉesa kaj atenta zorgo de mia Anjo. Vere la libroj estas sub mia propra inspekto, sed mi opinias, ke iom da polvo ne malutilos ilin — ili aspektas ja alie tiel fanfarone, tiel fiere kaj malsaĝe. Kaj la resto — hm, la resto propre estas neniu. Eble la lito — sed kio en la mondo povus esti pli pura ol la fraŭla lito!

La kusenoj kiel du cignoj. La kovrilo kiel floro de lilio. La litotuko kiel neĝo. La matracoj kiel bulketoj. La pajla matraco — — pajla matraco — —

»Anjo!«

»Vi deziras?«

»Kiam mi lastefoje remburigis per nova pajlo mian matracon?«

»Tion mi ne scias — dum mi estas ĉe vi, ne, — ĝi certe jam estas pecigita.«

Anjo servas ĉe mi ses jarojn. Mi penas rememorigi, kio estis antaŭ tiuj ses jaroj — sed vana penado. Mi aĉetis la matracon, remburitan kaj trakudritan, ankoraŭ en la tempoj de mia frua juneco — —

»Anjo!«

»Kion vi deziras?«

»Jen prenu sepdek kvin krejcarojn — iru tuj al pajlovestisto por aĉeti tri garbojn da pajlo — senprokraste mi diras.«

Anjo flugkuras. Anjo altrenas tri garbojn da pajlo. Ŝi kaptas la matracon, disŝiras la stebojn, enŝovas la manon en ĝian internon —

»Sed — kien mi donos la pajlon malnovan?«

La virina prudento estas tamen pli sprita ol la nia! Tiu ĉi penso ankoraŭ longe ne estus veninta al mi! Jes, antaŭ ol ni remburas la sakon per nova pajlo, ni devas forigi la eluzitan, sed — kien ĝin doni? Elĵeti ĝin tra fenestro sur ies kapon?«

»Kien oni donadas tian malnovan pajlon?«

»Tion mi ne scias.«

»Hm«, mi diras subite, »jen prenu la dekkrejcaron kaj iru en tiun altan domon. Tie oni havas kavon por balaajo, donu la moneron al la domgardisto, kaj li permesos al vi enŝuti la pajlon en la kavon.« Nu, la vira prudento ne estas ja ankaŭ ĉiam malŝatinda!

Ŝi foriris kaj alvenis. Ke la domgardisto ne volas. Ke la servistinoj ŝutadas en la kavon ankaŭ varman cindron, kaj ke la pajlo povus ekbruli. Kaj la kavo ankaŭ baldaŭ pleniĝus, kaj la komparano nuntempe ne venos por balaajo, nur en vintro, nun li havas sufiĉe da laboro hejme.

»Do, kion fari?«

»Mi ne scias.«

»Sed, sed«, mi krias post momento — la vira cerbo estas mirinde produktema! — »morgaŭ estas merkredo, la komunuma veturilo venos por balaajo! Prenu do la moneron, la dekkrejcaron, donu la duonon al la balaisto, kiu so-

noras, la duonon al la veturigisto, kaj ili mem enŝutos tion en la veturilon.«

»Bone, sed sur kio vi bonvolas hodiaŭ dormi? La matracon mi ne povas doni en la liton, ĝi estas malkunkudrita, kaj la pajlo elfaladus tra la tabuletoj.«

»Certe — nu, sed — do mi dormos sur la planko! Ni etendos la longan flankan kusenon de la kanapo sur la plankon, ŝetos kovrilon super ĝi — kaj mi dormos kiel princo — tio estos bela!«

Mi ankaŭ dormis kiel princo. Kaj tuj matene Anjo elportis la matracon en la koridoron, antaŭ la pordon kaj ni atendis. La sonorigisto venis, kaj mi rapide kliniĝis el la fenestro, por ke mi vidu, kio okazos. La veturilo brue alveturis, Anjo elkuris kun la matraco antaŭ la domon.

»Kaj eĉ se vi donus guldenon al mi, mi ne akceptos ĝin — mi ne povas, estas malpermesite«, ekkriis la veturigisto kaj irigis la ĉevalojn.

Anjo retrenis la matracon hejmen.

»Tio jam estas malsaĝa!«, mi diras.

»Jes, tio estas malsaĝa,« konsentas Anjo.

»Do zorgu ankaŭ vi almenaŭ iom pri tio — dio mia — demandu ie, kion faras aliaj homoj.«

Anjo flugiras. Preskaŭ post unu horo ŝi rapidas reen.

»Ke plej bone estas, forbruligi la pajlon en la forno.«

Nu, vere — strange ke tiu ideo ne venis al ni! Do bruligu! Kaj ĉu vi scias? Iru al niaj najbaroj kaj demandu ilin, ĉu ili ne intencos ion baki, kaj ĉu ili ne volas forte varmigi la baktubon. Aŭ purigi la fornon — ĉu vi komprenas?«

Anjo denove rapidegas. Kaj ŝi sciigas poste, ke nenie oni bakos, kaj ke oni nenie purigos la fornon. Kaj ŝi devas jam iri en foirejon kaj ne povas nun malfruigi sin per la bruligado. Nur vespere! Ke oni devas eĉ tio seninterrompe sidi. — Nu bone!

Venis la vespero, kaj ni finis la vespermanĝon. Anjo komencis eltiradi pajlon el la matraco, fari fasketojn kaj ŝetadi ilin en bakfornon. Dume mi sidigis en apuda ĉambro al mia skribotablo kaj mi aŭskultis, kiel bele la fumo trakuras la kamentubon kaj bruas. Kontente mi fumis mian virginian cigaron — tiun ĉi brueton en kamento mi treege amas!

Subita bruego antaŭ la domo. Homaj voĉoj ekstere, poste sonorado en la domo. Mi eksaltas kaj aŭskultas en la koridoron, kio okazas. Ke el nia kamentubo eliras la flamo kaj flugas ĝis la tria tegmento.

»Dio mia, Anjo — ĉesigu la bruligadon! Kaj rapide la matracon ien en la ĉambron, kaj se oni venos, faru mienon, kvazaŭ vi nenion scius. Ĉu la forno estas varmigita?«

»Tute ne — de kelkaj fasketoj — ĝi estas preskaŭ malvarma«.

Oni ne venis — danke Dion! La fajro ĉesis flugi super la tegmentoj, kaj la homoj sur la strato post kelka horeto disiris.

En malbona humoro mi daŭrigis mian fumadon. Kaj en ankoraŭ malpli bona humoro mi kuŝiĝis denove sur la plankon.

Kompreneble la sekvinta mateno denove refreŝigis min. Mi eliris en la straton por esplori. Mi demandis policiston. Mi demandis publikan serviston. Mi demandis ĉiujn sinjorinojn konatajn.

La policisto salutis: »Tion mi ne scias«. La servisto iom ekleviis la ĉapon: »Bedaŭrinde mi ne scias«. La sinjorinoj diris ĉiuj egale: »Jes, jes, ĉe tiaj aferoj estas malfacile konsili.«

